



## 12.2 Kursoplano pri intensa internacia kurso – parto 1

Priskribo de la cirkonstancoj de la kurso	Necesas atenti pri
<p><b>Kursohistorio:</b> La sube prezentata kursoplano estis kompilita kiel bazo por trisemajna intensa lingvokurso, al kiu la partoprenintoj devenis el 4 kontinentoj, el pluraj tre diversaj landoj kaj kulturoj. Por ili lerni Esperanton signifis akiri komunan lingvon pere de kiu ili planis ekhavi kulturajn kontaktojn kaj kunlaborojn, realigotajn ĉefe helpe de reta komunikado</p>	<ul style="list-style-type: none"> <li>- interkulturaj eduk-situacioj</li> <li>- bona preparo</li> <li>- detala intervjuo kun la pp-ontoj antaŭ la kurso</li> </ul>
<p><b>Celo de la kurso:</b> la kursanoj fine de la trisemajna kunlaboro kaj lernado estu kapablaj je ĉiutaga komunikado parole kaj skribe, povu skribi kaj paroli pri si mem, pri siaj lando, kulturo, socia vivo kaj problemoj, estu kapablaj kompreni la esencon de artikoloj, raportoj. Ili alproprigu lernoteknikojn, spertojn pri memstara laboro. Fine de la kurso okazu simplaj debatoj, prezentoj, aktiva kaj relative libera uzo de la lingvo. Post la kurso la kursanoj kapablu mem labori, progresi en la lingvolernado kaj komuniki inter si pere de korespondado.</p>	<ul style="list-style-type: none"> <li>- la evoluigo de ĉiuj kapabloj</li> <li>- instruo de lernoteknikoj</li> <li>- tekniko por korespondado</li> <li>- elekto de lernolibro por la posta memstara lernado</li> </ul>
<p><b>Intenseco:</b> tage minimume 6-8-hora dumleciona lernado, kaj pliaj 4-5 horoj en komunik-situacioj kun la grupanoj kaj kursgvidantoj.</p>	<ul style="list-style-type: none"> <li>- variaj aktivajoj</li> <li>- psika kaj fizika ŝarĝo</li> </ul>
<p><b>Loko:</b> la kurso disvolviĝis en - por ĉiu partoprenanto - fremda lando, inter bonaj kondiĉoj, kun plenaj servoj (kunloĝado, kunmanĝado, kursoj kaj distraj programoj samloke).</p>	<ul style="list-style-type: none"> <li>- bona uzo de la medio / - esperantigo de la ejo</li> </ul>
<p><b>Partoprenantoj:</b> junaj plenkreskuloj, kun minimume meza edukiteco, tamen ofte kun neniu kutimo studi, mense intense labori.</p>	
<p><b>Metodo:</b> ĉefe rekta, kun eblo doni pontolingvan (ne nepre nacian) helpon, se necesas. Uzo de multaj instruhelpiloj, objektoj, bildoj, naturo, situacioj. Pluraj teknikoj de la sugestopedia metodo estis uzataj. Ludoj, kunagadoj kaj grupa laboro estis aplikataj. Tuttage cellingva medio, ebligado de kunloĝado kun kursano(j) de alia kulturo.</p>	<ul style="list-style-type: none"> <li>- riĉa helpilaro</li> <li>- lingvokono de la gvidanto</li> <li>- natura eblo kaj neceso por la lingvouzo</li> </ul>
<p><b>Baza koncepto:</b> observi kaj instrui la vortprovizon kaj lingvaĵojn, kiujn la grupanoj bezonas por siaj komunikceloj; prezenti multon sen la pretendo, ke ĉiu konu ĉiun eron, sed kun la atendo, ke la grupo kune konu la tuton.</p>	<ul style="list-style-type: none"> <li>- adaptiĝemo</li> <li>- multe da preparlaboro dum la kurso</li> </ul>
<p><b>Laborformoj:</b> tutgrupa laboro, etgrupa laboro laŭ la komunaj pontolingvoj, para laboro (laŭ la lingvonivelejo, t.e. homogena aŭ heterogena); individua lernado, komputilaj lecionoj, individua konsultiĝo kun la kursgvidantoj.</p>	<ul style="list-style-type: none"> <li>- variigo de la laborformoj</li> <li>- kiu kiun formon preferas, kiel povas pli bone lerni</li> </ul>
<p><b>Instrumaterialoj:</b> preparitaj de la kursogvidantoj speciale por tiu kurso, ili estis ĉiutage adaptitaj al la situacio kaj bezonoj. Multaj afiŝoj, tabeloj surmure. La listojn de vortoj, ekzercojn, tekstojn kaj kantojn la kursanoj ricevas pofolie, kolektas ilin en bone organizita dokumentujo. Kursofine estis donata sonmaterialo, preparita de la kursogvidantoj, inkludanta surbendigitajn vortolistojn, lernitajn tekstojn kaj kantojn. Surloke estis je dispono biblioteko kun lernolibroj, vortaroj, revuoj, artikoloj, simplaj rakontoj, bildrakontoj, legolibroj.</p>	<ul style="list-style-type: none"> <li>- ebloj prepari materialojn antaŭ la kurso, sed multo preparatas dumkurse</li> <li>- bonaj teknikajoj</li> <li>- allogaj legaĵoj, motivigo</li> <li>- flekseco necesas</li> </ul>

## Utilo de la kursoplano

La ĵus prezentita parto de la plano kaj la antaŭaj informoj estas ne por blinde kopii kaj imite uzi ilin. Ili povas bone servi kiel bazo por imagi kiel oni komencas krei kursoplanon (unue priskribas la cirkonstancojn, kiel vi legis supre), difini kiuj estas la elementoj kaj el tiuj, kiuj eroj planeblas entute.

Oni ofte diras, ke „*planoj ekzistas por ke ili estu ŝanĝitaj*“. Tio multe veras rilate ankaŭ kursoplanojn, kiujn oni devas adapti laŭ la cirkonstancoj, tamen konscie kaj pripensite, modifi laŭbezone.

Tiel en la sekva plano (kiu laŭ la klasifiko estas miksaĵo de laŭfunkcia, gramatika kaj leksika planoj), ni ne difinis lecionojn, sed planis nur la sinsekvon kaj proksimuman enhavon de la sekvendaj instrupaĵoj. La temoj kaj la gramatikaĵoj ĝenerale restas fiksj, la leksika parto povas multe ŝanĝiĝi kaj kompletigi dum la kurso.

Kompreneble ankaŭ en la temoj (kaj sekve ĉe la dependaj gramatikaĵoj) povas okazi necesaj ŝanĝoj (iu lernanto demandas ion, okazas neplanita afero, kiu bezonas traktadon ktp), sed tiuj estas relative planeblaj kompare kun la cetero.

Necesas mencii, ke dum intensaj kursoj, kiam la grupanoj ne nur studas, sed ankaŭ loĝas surloke, la instrueblojn oni povas multoblige ekz. pere de slipetoj algluitaj sur ĉiun objekton de la medio; maksimuma eluzo de bildaj kaj aliaj helpiloj, afiŝeblaj surmure; kompilado de ĉiutaga kuriero; esperantigo de la taga menuo ktp. Kompreneble tiuj aferoj postulas enorme grandan kaj zorgan preparlaboron, sed okaze de regulaj aranĝoj la investo ne devas refariĝi ĉiufoje.

### Konsiloj

Trastudante la kursoplanon faru detalajn notojn pri via okazigota kurso, unue traitante la supre prezentitan tabelon kaj poste trovu la materialojn por viaj celoj plej konvenajn.

Ĉiokaze ne forgesu: estas ĉiam pli simple instrui el jam preta lernolibro, kies materialon vi pli-malpli povas sekvi kaj al kiuj vi de tempo al tempo devas aldoni aferojn, kiuj helpas adapti la lernilon al viaj cirkonstancoj ol ĉiun materialon mem prepari aŭ devi kolekti.

Tiajn faru nur tre spertaj kolegoj, kiuj havas kaj tempon kaj la necesajn konojn kaj rimedojn.

Se vi elektas uzi lernolibron, ankaŭ tiam preparu kursoplanon, sed en tiu okazo la bazon de la ŝtupoj donas la lecionoj mem. Tamen kolektu la lernendajn leksikojn kaj parolunuojn, aparte listigu la gramatikaĵojn, faru rimarkojn pri tiuj aferoj pri kiuj vi ne devus forgesi kaj zorge aldonu viajn komentojn post ĉiu leciono por la sekva uzo de la sama plano.



Plano, de vi mem farita, helpas organizi vin, noti la adaptaĵojn kaj specialaĵojn, kiuj nur vian kurson karakterizas. Ankaŭ el administra vidpunkto povas esti utile havi planon: vi mem povas scii (dokumenti) kaj pruvi la jam faritajn aferojn, kaj kiu ajn povas daŭrigi la laboron, se hazarde al vi intervenas iu obstaklo.

## Kursoplano – por intensa internacia lingvokurso – nivelo: tutkomencanta (parto 1)

Kiam?	Temoj	Konkreta leksiko	Gramatikaĵoj	Atentu! / Necesaĵoj	Dumkursaj rimarkoj
	Salutformoj Ĝentilaj esprimoj	Saluton. Bonan tagon/matenon/vesperon/nokton. Dankon. Nedankinde. Pardonu. Bonvolu. Bonan apetiton. Ĝis. Sanon. Kiel vi fartas? Bone, dankon.		Komuniksituaĵoj Ĉiu esprimo en nivelo de frazo, kiel komunikunuoj.	
	Sinprezento Renkontiĝo	Kiu vi estas? Kiel vi nomiĝas? Ĉu vi estas ....? (personaj nomoj) Mi estas ..... / Mia nomo estas ....		Nomŝildoj kun devenindiko, nacia flago Denove nur parolunuoj. Ni ne analizas gramatikaĵojn.	
	JES – NE	Ĉu....? Ĉu via nomo estas Karlo? Ne, <u>ne</u> mia nomo estas Karlo. Ne, mia nomo estas <u>ne</u> Karlo. Ktp	Neado.	Pozicio de 'ne'	
	Nacieco	Ĉu vi estas anglo, japano, hungaro, tuarego, franco ktp?		Veraj naciecoj	
	Loĝloko Geografiaj konoj	Kie vi loĝas? En kiu lando vi loĝas? Mi loĝas en Aŭstralio, en urbo... (landnomoj de la kursaĵoj) Kontinentoj .... En la suda (norda, okcidenta, orienta) parto de ~o	- prepozicio „en“ - landnomoj - kontinentoj - de	Mapo! Veraj devenlandoj! Mikrofono Vizitkartoj	
	ankaŭ	<u>Ankaŭ mi</u> loĝas en Aŭstralio.	Loko por „ankaŭ“.	Daŭre ripetenda!	
	Vortoriĝo	Vir(in)o, student(in)o, profesor(in)o, knab(in)o, amik(in)o, reĝ(in)o, kok(in)o, libro, tablo, seĝo, kajero ktp. KIO vi estas? Mi estas profesoro. Vi estas studento. Ŝi estas virino. KIO ĝi estas? Ĝi estas seĝo.	kopulo Sufikso: -IN Pers. pronomoj: mi, vi, li, ŝi, ĝi,	Objektoj de la medio kun slipetoj, bildoj, kartoludoj	
	Profesioj Kio estas via profesio?	Mi/vi/li/ŝi estas (ne) laboristo, ĝardenisto, ŝuisto, vendisto, bankisto (advokato, studento, inĝeniero, sekretariino). Ne mi estas inĝeniero, sed li.	Sufikso: -IST Ripeto de „neado“! sed	Laŭ la veraj profesioj de la grupanoj! Antaŭa enketo!	
	Pluralo	Ni estas viroj. Vi estas studentinoj. Ili estas amikinoj.	ni, vi , ili,		
	Artikolo	Li estas studento. Li estas la studento el Ganao.	LA / Ø		
	Verboj KION ... FARAS?	staras, sidas, kuŝas, laboras, studas, dormas, fumas, manĝas, ripozas, studas, trinkas, skribas, desegnas, legas, naĝas, telefonas, aŭskultas, silentas, demandas, helpas, kantas, respondas, korespondas, ludas, dancas, kuiras, ĉasas.	mi studas vi studas li, ŝi ĝi studas ni studas vi studas ili (ne) studas	Agoj, imitoj, pantomimo, bildoj	



	Imperativo	Studu! Ne dormu! Bonvolu studi. Bonvolu ne dormi!	-U!	Diktatora maniero - ĝentila maniero Ludo: organizo de orkestro	
	Mi (ne) ŝatas...	Ĉu vi ŝatas labori? (Jes, ne) Kion vi ŝatas fari? Mi ŝatas studi, kuri, promeni....dormi.	infinitivo	Ludoj, intervjuoj	
	Adjektivoj KIA?	<u>Koloroj</u> : blanka, nigra, ruĝa, blua, verda, flava, griza, oranĝkolora <u>Aliaj adj.</u> : bela, bona, granda, kara, alta, juna, simpatia, rapida, dika, kuraĝa, interesa, inteligenta, grava, riĉa, forta, internacia, diligenta, bongusta, multekosta ktp. <i>La profesoro estas juna. La studento estas diligenta.</i>	Prefikso: MAL- Sufiksoj: -ET, -EG,	Multaj bildoj! Objektoj. Naciaj flagoj! Ne ĉiu lernu ĉiujn vortojn, sed laŭeble ĉiuj kune lernu ĉiujn.	
	Numeraloj KIOM?	Nombrado de unu ĝis miliono		telefonnumeroj, adiciado. Bingo-ludo.	
	Akordigo	unu studento      unu bela virino <u>+ unu studento</u> <u>+ unu bela virino</u> <b>du studentoj</b> <b>du belaj virinoj</b>	Akordigo inter substantivoj kaj adjektivoj	Harmonio!!!	
	Konstruu frazojn!	La ~o estas ~a. <i>La virino estas bela.</i> La ~oj estas ~aj. <i>La viroj estas riĉaj.</i> La ~a ~o estas ~a. <i>La bela virino estas inteligenta.</i> La ~aj ~oj estas ~aj. <i>La riĉaj viroj estas dikaj.</i>		Preparu skemojn! Stimulu kreivecon!	
	Lingvonomoj	Ĉu vi parolas ~e? (angle, france, hispane, tuarege, esperante ktp)	Kiel? ~e kun lingvonomoj	Ripeto de nacinomoj, devenlandoj!	
	Adverboj - KIEL?	Ĉu vi parolas bone, rapide, perfekte, iomete...	Adverboj	Ludo de „Mirinfano“ <sup>1</sup> . Ripeto de ĉiuj verboj kun adjektivoj	
	.....	.....			

(KK)



<sup>1</sup> La ekzercon pri “Mirinfano” kun klarigoj vi trovas en la LERNILOTEKO de [www.edukado.net](http://www.edukado.net).